# Novjorka Prismo

Numero 107 Oktobro 2001


*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia oktobra kunveno*

DATO: Vendredon, la 19-an de oktobro 2001, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.
7:00 – Prelego de Alex Karkovsky: **Verkoj kaj vivo de la Japana-Esperanta poeto Vassily Yeroŝenko (1890-1952);** kaj Vidbendo pri Okemo ★

## Protokolo de la kunveno de la 21-a de septembro 2001

Tom ECCARDT malfermis la kunvenon je 7:01 ptm. Ĉeestis 17 personoj. George BAKER ĉeestis sian unuan fojon. George estas inĝeniero de pontoj. Li loĝis en San Francisko en Kalifornio dum la antaŭaj 18 monatoj, kaj nun li loĝas en Longa Insulo. Li memlernis Esperanton.

Tom demandis, ĉu iu ajn ĉe la kunveno perdis parencon aŭ amikon dum la tragedio ĉe la Tutmonda Komerca Centro. Neniu diris jes, sed kelkaj ĉeestantoj konas personojn, kiuj laboras en la areo, kiuj ne pereis. Tom proponis momenton da silento.

Post la momento da silento, la anoncoj komenciĝis. Tom anoncis, ke ne estos ĉi-jare la librofoiro, pro la tragedio.

Okazis manifestacio pri la tragedio ekster la oficejo, kie ni okazigas niajn kunvenojn. Oni povis aŭdi laŭtajn bruojn de personoj kaj de polic-veturiloj.

Tom menciis, ke la kunveno kun la kanadaj kaj usonaj esperantistoj ĉe Okemo en Vermont okazos venontmonate, komencante la 6-an, kaj daŭrante ĝis la 8-a de oktobro.

Rochelle F. GROSSMAN ricevis faksojn kaj leterojn de nederlandanoj, kiuj maltrankviliĝis pri la farto de la novjorka esperantistaro post la tragedio. Nijl BLONSTEIN montris al la grupo enciklopedieton, kiu enhavis artikolojn pri Esperanto kaj en la sama paĝo pri la moderna turka lingvo. Pam LIEBER kunportis librojn en Esperanto por vendi. Maki SANO parolis pri libro skribita de iu d-ro Kobajaŝi pri Usono kaj siaj rilatoj kun la resto de la mondo.

Je 7:50 ptm komenciĝis la programo, kiu temis pri la Esperanto-rilataj someraj spertoj de kelkaj ĉeestantoj. Tom LEONG komencis. Li iris al la Universala Kongreso en Zagrebo, Kroatio. Li ankaŭ restis en Istanbul, Turkio. Alex KARKOVSKY ankaŭ iris al la UK. Li ankaŭ ĉeestis la SAT Kongreson en Hungario. Rochelle iris al Albanio kun kelkaj esperantistoj el diversaj landoj. Pam iris al Salt Lake City, en Utah. Ŝi estis la sola ano el nia Societo, kiu ĉeestis la ĉi-jaran ELNA Kongreson.

Tuj post tiuj rakontoj, Tom fermis la kunvenon ĉe 8:54 ptm. Poste, kelkaj personoj iris al la restoracio My Cousin Vinny's por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Laste vizitis UEA/Novjorkon

La 14-an de aŭgusto David OGILVIE kaj lia edzino (Brooklyn, NY) vizitis. S-ro Ogilvie klarigis, ke li kaj lia filo, universitat-studento, nun studas Esperanton. Mi donacis multajn broŝurojn kaj invitis s-ron Ogilvie kaj la filon ĉeesti kunvenojn de la Esperanto-Societo de Novjorko; ili venos kiam ili sufiĉe bone scios la lingvon.

La 5-an de oktobro Denis VILLANUEVA de la firmao Crédit Agricole Indosuez (Novjorko) vizitis por eklerni pri Esperanto. Li ofte vojaĝas kaj rimarkas kiel multe la mondo bezonas ian universalan lingvon. Li trovis la vorton "Esperanto" ie kaj telefonis kaj venis por scii pri la lingvo. ★

– *Rochelle F. GROSSMAN*



*Ĉeestantoj dum nia septembra kunvenno.*

## Du koncertoj

Lastatempe okazis du koncertoj de lokaj esperantistoj. La unuan de oktobro Thomas Morgan kantis *La Esperon* dum senpaga koncerto "Donaco de Muziko" ĉe la klubo The Bottom Line en la Vilaĝo. La koncerto honoris la memoron de la perditoj de la WTC kaj ĝi aŭdiĝis per radio. *La Espero* aŭdiĝis dum serio da naciaj himnoj, kiujn aranĝis kaj registras la pianisto Garry Dial por sia nova nacihimno-projekto. Post la koncerto, nia ano Maki Sano sendis la sekvan mesaĝon al Thomas:

*Koran dankon pro via belega prezento ĉe The Bottom Line. Certe, tio estis la plej bela "La Espero" kiun mi aŭdis en mia vivo! Kaj jes, mi estas iu, kiu kriegis "Vivu Esperanto!" post via prezento . . .*

Merkredon, la 3-an de oktobro, nia ano Jon Liechty prezentis propran komponaĵon, kun 5 aliaj komponistoj, dum koncerto ĉe The Turtle Bay Music School. Ankaŭ okazis diskutado. ★

– *Jim MEDRANO*

## f u cnt rd ths . . .

Se vi ne povas legi ĉi-tiun frazon, vi devas ĉeesti nian senpagan kurson. Having trouble reading the last sentence? Then have I got a course for you! Come to our free beginners' course on Tuesday October 23, 2001 at Stuyvesant Adult Center, 345 East 15th St., NY. Classes are weekly, 7:30 - 9:00 pm in room 411. No registration necessary. ★

– *Tomaso ECCARDT*

## Letero de UEA

Kara Jim: Mi skribas al vi nur por danki vin kaj la anojn de la Novjorka Esperanto-Societo, kiuj bonvolis sendi al mi ekzempleron de via revueto *Novjorka Prismo*. Mi estas tre kontenta vidi, ke via agado antaŭeniras malgraŭ ĉiuj lastatempaj problemegoj. ★

*Tre amike, Renato CORSETTI*

## World Assembly on Ageing

La 4-an de oktobro mi ĉeestis programon pri la Internacia Tago de Pli Aĝaj Personoj; ĝi estis la 11-a jara memorfesto. La temo estis "The Challenge for the Second World Assembly on Ageing: Build a Society for All Ages." La memorfesto devis okazi ĉe UN sed, pro sekurec-reguloj, AARP helpis rezervi belan salonon en alia konstruaĵo. Thérèse Gastaut de la Departamento de Publika Informado de UN legis mesaĝon de Kofi Annan, Ĝenerala Sekretario de UN. S-ro Inocencio F. Arias, la reprezentanto de Hispanio ĉe UN, parolis kiel gastiganto de la Mond-Asembleo, kiu okazos en Madrid, 8-22 aprilo 2002. Ankaŭ prelegis reprezentantoj de Germanio, Irano, Kazaĥio, kaj Urugvajo. La konata Marcel Marceau prelegis buŝe, ne geste; li estas Bon-Vola Ambasadoro por la Mond-Asembleo.

Oni prezentis du vidbendojn: la unua de la princino Doña Infanta Cristina de Hispanio, Bon-Vola Ambasadoro por la Mond-Asembleo; la dua "De Vieno al Madrido" (la unua Mond-Asembleo okazis en 1982 en Vieno). S-ro Nitin Desai, Sub-Ĝenerala Sekretario de UN por ekonomiaj kaj sociaj aferoj, finis la programon. ★

– *Rochelle F. GROSSMAN*

## UNA/USA

La 11-an de oktobro mi ĉeestis kunvenon de la Queens filio de UNA pri la sukceso aŭ malsukceso de la World Conference against Racism, Racial Discrimination, Xenophobia, and Related Intolerance, kiu okazis en Durban, Sud-Afriko, de la 31-a de aŭgusto ĝis la 7-a de septembro 2001. Prelegis d-ro Juergen Dedering, antaŭa stabano de UN, kiu nun instruas kursojn pri UN kaj tre ofte prelegas pri UN aferoj. Li tre detale klarigis tion, kio okazis dum la konferenco kaj poste ni partoprenis en tre vigla diskuto. ★

– *Rochelle F. GROSSMAN*

## Okemo 2001

La 8-a Internacia Semajnfino Esperantista estis plia sukceso por orientaj esperantistoj de Norda Ameriko. Mi kaj ses aliaj homoj (entute 6 novjorkianoj kaj 1 pensilvaniano) ekaŭtomobilis kune sabaton matene kaj atingis Ludlow, Vermont, posttagmeze.

Kiel kutime, estis kursetoj por komencantoj kaj por progresintoj, amikeca vespero, kaj kultura vespero. Sed malkutime, esperantistaj steluloj kiel Duncan Charters, Mark Fettes, kaj Grant Goodall venis de malproksimaj lokoj kaj kontribuis al la programaro kaj la etoso.

La temo de la kunveno estis *Kulturo de paco per Esperanto*, kaj efektive oni parolis pri "Indiĝenaj kaj mondaj dialogoj", kaj pri "Pli bona mondo".



Dimanĉon matene okazis oratora konkurso kaj vespere nia komuna bufeda festa vespermanĝo. Posttagmeze mi mem prelegis pri la sep nanolandoj de Eŭropo. Post la bongusta bufedo, prezentiĝis kultura vespero, kun vidbendoj de kelkaj Esperanto-filmoj.

Mi ne ĉeestis la tutan kunvenon, ĉar sabaton mi iris sesdek mejlojn en Nov-Hampŝiron por viziti malproksimajn parencojn el Weisweil, Germanio, mia pra-patro-urbo. Ili havas farmon dediĉita duone al lakto-farmado kaj duone al ĝojigi turistojn, kiuj venas kun infanoj por vidi bestojn kaj variajn kaj ekzotikajn. Oni bonkorege gastigis min.

Denove Okemo estis malmultekosta manĝero ĉeesti Esperanto-kongreseton kaj ĝui la freŝan aeron kaj la belajn foliojn de Nov-Anglujo. Bonvolu veni al la klubkunveno por vidi vidbendon pri iom de ĝi. Ĝis la venonta jaro, Okemo! ★

– *Tomaso ECCARDT*

## Societa kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Oktobro**

**19** — **ESNY Kunveno – Alex Karkovsky prelegas pri Vassily Yeroŝenko**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**23** — Free Beginners' Esperanto Class begins at Stuyvesant Adult Center
*Tuesdays, 7:30-9:00 pm*

**Novembro**

**4** — **Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe SONY Plaza*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 108)

**16** — **ESNY Open House**
*Friday, 6:30 pm at UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**SONY Plaza Atrium**
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium

**Stuyvesant Adult Education Center**
345 East 15th Street (1st/2nd Avenues) NYC
Fourth floor, room 411

## Furoro ĉe UEA

Lastatempe furoris diversaj rakontoj pri la demisioj de tri altrangaj oficistoj de la CO de UEA. Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA, Pasquale Zapelli, la direktoro de la CO, kaj Istvan Ertl, redaktisto de la revuo *Esperanto* samtempe demisiis dum la UK en Zagrebo, kaj en leteroj aperintaj diversloke en la Interreto ili menciis malharmonion inter oficistoj kaj estraranoj Renato Corsetti (nova prezidanto) kaj Michela Lipari (jus reelektita al la estraro). Ankaŭ, ili denuncis la traktadon (oficialan esploron) de akuzo kontraŭ alia oficisto pri seksa perforto fare de Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo-estraranoj (TEJO) Sabira Stahlberg kaj Sjoerd Bosga.

Kiel prezidanto de la Ligo de Samseksamaj Ge-Esperantistoj, mi petis por nia revuo *Forumo* la opinion de Kep Enderby, ĵus eks-prezidantiĝinto de UEA, eksjuĝisto kaj ministro pri justeco, kaj gvidanto de la denuncita esploro pri la akuzo. Laŭ li, la esploro ne rekte traktis la akuzon, sed la akuzantojn. La esploro trovis la akuziton senkulpa, sed la estraranoj trovis la akuzintojn malmaturaj kaj malsaĝaj sed ne malicaj. La akuzo ne estis oficiale diskutita de la estraro de TEJO; same ne estis tie diskutitaj aliaj tiaj akuzoj kontraŭ aliaj TEJO-anoj.

Radio Vieno en du el la ĉiusemajnaj radiaj kaj interretaj elsendoj amplekse kaj senbride diskutis la krizon kun UEA-komitatanoj: Christian Darbellay kaj Ans Bakker. Oni timas, ke la servoj kaj laboro de la CO estos konsiderinde bremsitaj pro manko de sperto post la foriro de la tri demisiantoj kaj du emeritiĝintoj. Antaŭvideblas gravaj ŝanĝoj en la CO sub novaj oficistoj elektotaj de la nuna estraro de UEA.

La leteroj de la demisiantoj estas legeblaj en la Interreto en la arĥivo de la novaĵgrupo <soc.culture.esperanto> sub la nomo de Renato Corsetti. La artikolo de Kep Enderby estas legebla ĉe

http://hem.bredband.net/andnor/lsg/laafero.htm>. ★

– *Arnold VICTOR*


**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Korespondа Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (718) 671-5699
**Program-Direktoro** Susan Kohn (212) 226-0443

**Novjorka Prismo**
Numero 107 – Oktobro 2001
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com


© 2001 Esperanto Society of New York